# Esperanto - La Bitbulteno 105

esperanto.es

## APÚNTATE A LOS EXÁMENES LIBRES DE ESPERANTO EN LA UNED

La Universidad Nacional de Educación a Distancia (UNED) ha abierto una convocatoria de exámenes libres de idiomas, incluyendo el esperanto. No se trata del curso (que tiene su propio plazo de matrícula), sino de exámenes para obtener un diploma oficial de la Universidad.

Los exámenes de esperanto se presentan en los tres niveles homologados para el curso: A2, B1 y (este año por primera vez) también el B2.

También es posible matricularse y presentarse al examen en otros países donde la UNED tiene su sede.

El plazo de matrícula finaliza el 31 de marzo de 2026. Los exámenes tendrán lugar a finales de mayo o comienzos de junio. ¡Aprovecha la oportunidad de obtener un diploma oficial de esperanto!

Más información en la web de la UNED.




## SEGUNDA CUOTA REDUCIDA PARA EL CONGRESO ESPAÑOL DEL 2026

También a finales de marzo finaliza el periodo para disfrutar de una cuota reducida para apuntarse al 84º Congreso Español de Esperanto que, como ya hemos informado en otros boletines, se celebrará en la ciudad de Portugalete, muy cerca de Bilbao, del 14 al 18 de julio de 2026.

El Comité Organizador ya ha anunciado el programa provisional, incluyendo las excursiones durante la semana. Mira todos los detalles en la página web https://kongreso.esperanto.es/, donde puedes ver diversas informaciones prácticas y la lista de apuntados hasta la fecha.






## CONGRESO INTERNACIONAL JUVENIL EN CATALUÑA

Un poco más tarde, del 9 al 16 de agosto, tendrá lugar cerca de Barcelona, concretamente en la localidad de Tiana, el Congreso Internacional Juvenil de Esperanto (IJK), una magnífica oportunidad para hablar en esperanto en un ambiente divertido y cultural al mismo tiempo.

La sede será "La Conreria", un antiguo monasterio, con todas las instalaciones necesarias y situado en un entorno natural. A la vez la proximidad a Barcelona permitirá visitar lugares muy interesantes, con un amplio programa de excursiones, incluyendo algunas relacionadas con el Año Gaudí, que se conmemora en 2026.

Además, durante el Congreso se podrá disfrutar de un evento natural único: el eclipse de sol que será visible desde el norte de la península.

Durante una semana en las montañas de Tiana, cientos de jóvenes de todo el mundo usarán un lenguaje común para reflexionar sobre un camino común hacia el futuro. ¡Únete ya al IJK 2026!

Visita la página web del congreso, ijk2026.tejo.org, para leer toda la información y apuntarte mediante el formulario de inscripción.





## EXPOSICIÓN VIRTUAL POR EL MES DE LA MUJER

La Bitoteko (repositorio digital) de la Federación Española de Esperanto participa un año más en la exposición virtual que HISPANA (el centro de recursos para la transformación digital de archivos, bibliotecas y museos, parte de Europeana) ha preparado con motivo de la celebración del Mes de la Mujer.

Nuestra contribución es una semblanza sobre Amalia Núñez Dubús, escritora en esperanto y pionera del esperantismo español. Puedes leer el interesante artículo en este enlace.





Junta directiva del grupo Esperantista que de acuerdo con la Excma. Diputación foral de Navarra ha traducido al esperanto y repartirá por todo el mudo el programa oficial del congreso de viti-vinicultura.—1. Doña Ana Sanz (Presidenta) 2. Dr. D. Fermín Aldáz (Presidente).—*(Fotog. Roldán e hijo)*

## ENTREVISTA SOBRE LA BIBLIOTECA DE LA FEDERACIÓN

La web especializada Alquibla ("Una mirada al mundo de las bibliotecas") ha publicado una entrevista a Ana Manero, responsable de la Biblioteca Juan Régulo Pérez de la Federación Española de Esperanto, con el resumen: "Las bibliotecas son imprescindibles para la preservación y difusión de la cultura en esperanto. Representan la memoria colectiva de la comunidad".

Puedes leerla en este enlace.





## EN LA RADIO

El 15 de enero, Toño del Barrio y Elsa Martínez fueron entrevistados en la radio nacional COPE, en el programa "La tarde", durante un amplio tiempo. Puedes escuchar la grabación con un resumen (con el título, algo engañoso, "A los 3 meses ya era capaz de hablar esperanto") en este enlace.

En enero, Jorge Camacho fue entrevistado dos veces en Radio Nacional sobre su poemario bilingüe "Gadir". Primero, en el programa en árabe de Radio Exterior de España, que puede escucharse como podcast (min. 20, después de las noticias), y unos días después, en el programa "España en el corazón" (min. 23).

Ana Manero participó en el programa "Olvida tu equipaje" de Radio Utopía, presentando su libro sobre Maruja Mallo. Puedes escuchar su entrevista, también con la participación de Miguel Fernández, en este enlace.






**SALIMOS EN "EL PRECIO JUSTO"**

El programa del famoso concurso televisivo «El precio justo», en el que participó un grupo de esperanto (sobre la convocatoria informamos en el último número de La Bitbulteno), se emitió el 20 de febrero. Un grupo de esperantistas apareció con camisetas verdes, y uno de nosotros, Mario Wenceslao, compitió y habló sobre el esperanto.

El programa puede verse en la web de Telecinco (con el título principal: «Un concursante de ‘El precio justo’ sorprende a Carlos Sobera con su idioma creado: ‘La gramática es muy personal’»), y también en la Bitoteko de la Federación.




**PARTICIPA EN LOS CONCURSOS LITERARIOS DE LA UEA**

El 31 de marzo es la fecha límite para la recepción de inscripciones para el 77º Concurso Literario de la Asociación Universal de Esperanto (UEA), los *Belartaj Konkursoj*.

Este año se celebran nueve modalidades de concurso: Poesía, Prosa, Micronovela, Ciencia Ficción y Fantasía (por primera vez este año), Teatro, Obra corta teatral (monólogo, sketch, obra de un acto, etc.), Ensayo, Libro Infantil del Año y Letra de Canciones.

Puedes consultar más detalles y condiciones, así como la información para la presentación de candidaturas aquí. El reglamento detallado se encuentra en el sitio web de la UEA. Las obras de los Concursos Literarios que se premien este 2026, se publicarán en el volumen "Belarta Rikolto 2026". Recordamos que el presidente y secretario de los concursos son los escritores españoles Miguel Fernández y Miguel Gutiérrez Adúriz, respectivamente.

¡Esta es tu oportunidad! ¡Participa!



## SÍGUENOS EN REDES SOCIALES

## ALIĜU AL LA LIBERAJ EKZAMENOJ DE ESPERANTO EN UNED

La hispana Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (UNED en la hispana siglo) malfermis kunvokon por "liberaj" ekzamenoj de lingvoj, inklude de Esperanto. Ne temas pri la kurso (kiu havas sian propran periodon de enskribiĝo), sed pri ekzamenoj por ricevi oficialan diplomon de la Universitato.

La ekzamenoj pri la lingvo Esperanto prezentiĝas en la tri niveloj aprobitaj por la kurso, nome A2, B1 kaj (ĉijare unuafoje) ankaŭ B2.

Eblas enskribiĝi kaj ekzameniĝi ankaŭ en aliaj landoj kie la UNED havas sidejon.

La periodo por enskribiĝo finiĝas la 31-an de marto 2026. La ekzamenoj okazos du monatojn poste. Profitu la okazon ekposedi oficialan diplomon de Esperanto!

Pliajn detalojn (hispane) legu ĉe la retejo de UNED.

## DUA REDUKTITA KOTIZO POR LA HISPANA KONGRESO DE 2026

Ankaŭ fine de marto estas la limdato por profiti de la dua reduktita aliĝkotizo por la 84-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu, kiel ni jam raportis en aliaj bultenoj, okazos en la urbo Portugalete, tre proksime al Bilbao, de la 14-a ĝis la 18-a de julio 2026.

La Organiza Komitato jam anoncis la provizoran programon, inkluzive de ekskursoj dum la semajno.
Vidu ĉiujn detalojn en la retejo https://kongreso.esperanto.es/, kie vi povas konsulti diversajn praktikajn informojn kaj la liston de ĝis nun registritaj partoprenantoj.






## INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE ESPERANTO EN KATALUNIO

La 82-a Internacia Junulara Kongreso de esperanto okazos ĉijare en Katalunio, konkrete de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2026 en la urbeto Tiana, nur 15 km for de Barcelono, organizata de la Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ).

Tiana kuŝas inter la Mediteraneo kaj la ĉemara montaro kiu formas la naturparkon Serralada de Marina, verdan rifuĝejon plenan je mediteraneaj arboj kaj plantoj. Tie troviĝas la gastejo de IJK, "La Conreria", iama monaĥejo, kiu disponigos al la partoprenantoj ĉiujn necesajn instalaĵojn. La proksimeco al Barcelono ebligos ekskursojn por esplori la mirindaĵojn de la ĉefurbo, kaj krome estas planitaj ekskursoj al aliaj urboj. Por la nokta programo, oni planas inviti muzikgrupojn esperantajn kaj katalunajn.

La kongreso koincidos kun mirinda natura fenomeno. La 12-an de aŭgusto oni povos spekti plenan suneklipson, videblan preskaŭ nur en la nordo de Iberio. Aldone, kongresanoj havos ŝancon ĝui Jaron Gaudí, solenante la 100-jariĝon de la morto de la mondfama arkitekto. Pro la natura fenomeno de la suneklipso kaj la graveco de naturo en la arkitekturo de Gaudí, la temo de la kongreso estos “Naturo el la Homaj Okuloj”. Ĝi celas inspiri dialogon pri daŭripovo kaj interkultura kunlaboro.

Dum unu semajno en la montoj de Tiana, centoj da junuloj el la tuta mondo uzos komunan lingvon por pripensi komunan vojon antaŭen. Nun estas via tempo por tuj aliĝi al la IJK 2026: vizitu la retejon de la kongreso, ijk2026.tejo.org, por legi ĉiujn informojn kaj aliĝi.



## VIRTUALA EKSPOZICIO EN LA MONATO DE LA VIRINO

Hispana Esperanto-Federacio partoprenas en virtuala ekspozicio de la bita kolektejo HISPANA (hispania parto de Europeana), por reliefigi la rolon de virinoj en la socio, okaze de la kunmemoroj de la monato de la virino.

Nia kontribuo estas artikolo pri Amalia Núñez Dubús, pioniro de la lingvo kaj elstara verkistino en Esperanto. Vi povas legi la interesan artikolon pri ŝi (hispane) ĉi tie.






## INTERVJUO PRI LA BIBLIOTEKO DE HEF

La faka retejo Alquibla ("Rigardo al la mondo de bibliotekoj") publikigas intervjuon kun Ana Manero, respondeculo de la Biblioteko Juan Régulo Pérez de Hispana Esperanto-Federacio. Ilia resumo: "Bibliotekoj estas esencaj por la konservado kaj disvastigo de la esperanta kulturo. Ili reprezentas la kolektivan memoron de la komunumo."

Vi povas legi ĝin en tiu ĉi ligilo.

## EN LA RADIO

La 15-an de januaro Toño del Barrio kaj Elsa Martínez estis intervjuitaj en la tutlanda radiostacio COPE, en la programo "La tarde", dum sufiĉe longa tempo. La registradon kun teksta resumo (kun la iom misinterpretebla titolo "A los 3 meses yo ya era capaz de hablar esperanto") vi povas aŭskulti en tiu ĉi ligilo.

En januaro Jorge Camacho estis dufoje intervjuita en la ŝtata radio pri sia dulingva poemaro "Gadir", unue en la arablingva elsendo de Radio Exterior de España, kiun oni povas aŭskulti podkaste (depost minuto 20a, post la novaĵoj), kaj kelkajn tagojn poste en la programo "España en el corazón" (minuto 23a)

Ana Manero partoprenis en la programo "Olvida tu equipaje" (Forgesu vian bagaĝon) en Radio Utopía, prezentante sian libron pri Maruja Mallo. Vi povas aŭskulti ŝian interparoladon, kun la partopreno ankaŭ de Miguel Fernández, en la ligilo: https://mallonge.net/OTEmaruja.




## NI APERIS EN "EL PRECIO JUSTO"

La programo de la televida konkurso "El precio justo" (La ĝusta prezo) en kiu aperis Esperanto-grupo (pri kies kunvoko ni informis en la pasinta numero de La Bitbulteno) estis elsendita la 20-an de februaro. Grupo de esperantistoj aperis kun verdaj t-ĉemizoj, kaj unu el ni, Mario Wenceslao, konkursis kaj parolis pri Esperanto.

La peco estas spektebla en la retejo de Telecinco (kun ĉeftitolo: «Un concursante de 'El precio

justo' sorprende a Carlos Sobera con su idioma creado: 'La gramática es muy personal"»), kaj ankaŭ en la Bitoteko de HEF.




**PARTOPRENU EN LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA**

La 31-an de marto finiĝas la limdato por ricevo de konkursaĵoj por la 77-aj Belartaj Konkursoj de UEA.

Ĉi-jare estas naŭ konkursaj branĉoj: Poezio, Prozo, Mikronovelo, Sciencfikcio kaj Fantasto, Teatraĵo. Mallonga teatraĵo (monologo, skeĉo, unuaktaĵo ktp), Eseo, Infanlibro de la Jaro, Kantoteksto. En tiu ĉi eldono oni enkondukas la subbranĉon "Sciencfikcio kaj Fantasto", kies unua premio havas la nomon "Premio Charles Power", omaĝe al la samnoma iama Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, verkisto, tradukisto kaj ŝatanto de scienco kaj sciencfikcio, kiu forpasis en aprilo 2025.

Vi povas legi pliajn detalojn kaj kondiĉojn, krom la detalojn por prezentado ĉe: https://sezonoj.ru/2025/10/gk-298/. Detala regularo troviĝas en la retejo de UEA. La verkoj de la Belartaj Konkursoj, premiitaj en 2026, legeblos en la volumo *Belarta rikolto 2026*, eldonota de Mondial. Ni memorigas ke la prezidanto kaj sekretario de la Konkursoj estas respektive la hispanaj verkistoj Miguel Fernández kaj Miguel Gutiérrez Adúriz.

Tiu ĉi estas via ŝanco, partoprenu!




**SEKVU NIN EN SOCIETAJ RETOJ**

Alia maniero resti informata pri la agadoj de la Hispana Esperanta Federacio estas sekvi nin en sociaj retoj.

Kiel ni anoncis en la antaŭa numero, ni ĵus malfermis Instagram-konton, @esperanto_es, kiu jam havas pli ol 160 sekvantojn. Ni ankaŭ estas aktivaj en Facebook, https://www.facebook.com/esperanto.es, kun pli ol 2000 sekvantoj.

Plue, ni volas informi vin, ke ni ĉesis nian agadon en X (antaŭe Twitter), almenaŭ provizore.

Ankaŭ vi povas viziti nian YouTube-kanalon, nian retejon kaj nian dissendoliston por anoj. Partoprenu kun ni!